

NOKTOMEZO

DE MAO DUN
ELĈINIGITA DE LAŬLUM

子夜



ĈINA FREMDLINGVA ELDONEJO



NOKTOMEZO

DE MAO DUN
ELĈINIGITA DE LAŬLUM



ĈINA FREMDLINGVA ELDONEJO
BEIJING ĈINIO 2010

图书在版编目 (CIP) 数据

子夜：世界语/茅盾著；李士俊译.——北京：
外文出版社，2010
ISBN 978-7-119-06455-0

I. ①子… II. ①茅… ②李… III. ①长篇小说—
中国—现代—世界语 IV. ①I246.5

中国版本图书馆CIP数据核字(2010)第088582号

责任编辑：陈 吉 孙 艾
出版执行：苏漪军
装帧设计：扈旭东

子夜


茅 盾 著
李士俊 译
©2010外文出版社

出版发行

外文出版社
地址：中国北京百万庄大街24号
邮政编码：100037
网址：<http://www.flp.com.cn>
电话：008610-68320579（总编室）
008610-68995928（世界语编辑部）
制版：北京火天堂文化传播有限公司
印刷：北京启恒印刷有限公司

开本：889mm×1194mm 大1/32 印张：16.5
2010年第 1 版 第 1 次印刷
（世界语）
ISBN 978-7-119-06455-0
4000（平装）

版权所有 侵权必究 有印装问题可随时调换



茅盾

MAO DUN

PRI MAO DUN

Mao Dun estas plumnomo de Shen Dehong, alnomata per Yanbing (1896-1981), kiu naskiĝis en la 4-a de julio, 1896, en la urbeto Wuzhen de Tongxiang-Gubernio, Zhejiang-Provinco. Tiu loko riĉa je rizo kaj fiŝoj kun plej disvolviĝinta agrikulturo en la moderntempa Ĉinio najbaras al la moderna urbego Ŝanhajo kaj estis abunda je kulturaj eminentuloj, kaj ĉio tio kontribuis al formiĝo de la psika kuraĝo de Mao Dun esti malferma al la monda kulturo kaj beletra stilo detalisma.

En sia dekjara aĝo Mao Dun perdis sian patron kaj li pasigis sian knabecon sub la flegado de la patrino. Post finstudo de la prepara kurso de la Pekina Universitato, li ne povis daŭrigi sian studon pro ekonomia malfacilo de sia familio, kaj li eklaboris en la Komerca Eldonejo en Ŝanhajo, reformis la malnovan gazeton *Noveloj kaj Romanoj de la Monato*, fariĝis la ĉefa komentariisto de la Literatura Instituto. En 1921, li membriĝis al la Komunista Grupo de Ŝanhajo kaj patoprenis la fondon de la Ĉina Komunista Partio.

En printempo de 1927, Mao Dun eklaboris kiel la ĉefredaktoro de la *Respublika Ĵurnalo* en Hankoŭ kaj dum la periodo de aprilo ĝis julio, li verkis pli ol 30 ĉefartikolojn kaj komentojn por la Ĵurnalo. Por eviti areston far reakciuloj de Kuomintango al li, li komencis sian literaturan verkadon sub la plumnomo Mao Dun.

En 1927, post la ĉeso de la kunlaborado de Kuomintango kaj la Ĉina Komunista Partio, Mao Dun fuĝis de Wuhan al Ŝanhajo

kaj Japanio kaj komencis verkadon de sia unua Trilogo Elipso Elreviĝo, Ŝanceliĝo kaj Strebado kaj la romano Ĉielarko kaj fariĝis verkisto de romanoj. Lia vivsperto pri la supera politika batalo en tiu periodo formis lian kapablon por resumi la epokon kaj lian literaturan vidkampon pri la tuta socio kaj liaj verkoj en la frua periodo ĉefe prenis sian materialon el tio.

En aprilo de 1930, Mao Dun revenis de Japanio al Ŝanhajo kaj baldaŭ membriĝis al la Unuiĝo de Maldekstraj Verkistoj kaj laboris kiel ĝia aganta sekretario. Ekde tiam li laboradis kune kun Lu Sin en revoluciaj literaturaj kaj sociaj aktivadoj.

De 1927 ĝis 1937 estis la stadio por la maturiĝo kaj abunda rikolto de la literatura verkado de Mao Dun. En tiu periodo li verkis la longan romanon *Noktomezo* kaj la mezlongajn romanojn *Vojo*, *Trio Iras Kune*. Kaj en tiu tempo li verkis ankaŭ la novelojn *Butiko de Lin-Familio*, la *Kamparan Trilogon: Printempaj Silkraŭpoj*, *Aŭtuna Rikolto*, *Restaĵo de Vintro* k. a. novelojn, kaj li ĉinigis la *Diplomon* de la sovetunia verkisto V. N. Danĉenko kaj la romanon *Milito* de alia sovetunia verkisto N. S. Tiĥonov, k. a.. Kaj krome li ankaŭ verkis grandan nombron da eseoj, mallongaj komentoj pri literaturaĵoj kaj studoj pri verkistoj por la feliĉtono Libera Babilo de la ĵurnalo Shen Bao kaj la gazetoj Taibai kaj Literaturo..

En la periodo 1937-1949 li migradis de Hongkongo, al Xinjiang, Yan'an, Chongqing kaj Guilin, kaj publikigis siajn romanojn *Korodo*, *Folioj Ruĝas pro Prujno kiel Floroj*, *Hardado* kaj kreis la dramon *Antaŭ kaj post la Klaro kaj Brilo*. En junio de 1945, la rondoj de progresemaĵoj artistoj kaj literaturistoj kunvenis por celebri la 25-jariĝon de la verkado de Mao Dun kaj lanĉis kreon de literatura premio je la nomo de Mao Dun.

Post la fondaĵo de la Ĉina Popola Respubliko en 1949, Mao Dun laboris kiel vicprezidanto de la Federacio de la Ĉinaj Literaturaj kaj Artista Asocioj, ministro de la Kultura Ministerio de la Centra Popola Registaro, vicprezidanto de la Tutlanda Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco kaj li jam apenaŭ disponis

NOKTOMEZO

tempon por verkado. En siaj lastaj jaroj, li sin okupadis malgraŭ
turmento de malsanoj per verko de daŭrigo de la romano *Folia
Ruĝas pro Prujno kiel Floroj*, kaj rememoroj pri sia vivo *La Voj
Irita de Mi*. La Popola Literatura Eldonejo eldonis la *Verkaron de
Mao Dun* en 40 volumoj ekde la jaro 1983, en kiuj kolektiĝis ĉiu
liaj literaturaj verkoj.

En la 27-a de marto, 1981, Mao Dun forpasis pro malsano en
Pekino. Antaŭ sia foriro, li donis sian akumulitan monon kaj kreis
la Literaturan Premion de Mao Dun por stimuli kreadon de bonaj
romanoj en Ĉinio.

ANTAŬPAROLO

al la Esperanta versio

Prof. Li Xiu

Mao Dun (1896-1981) estis pioniro de la ĉina moderna progresema kulturo, granda revolucia verkisto, literatura teoriisto kaj kultura aktivulo, kiu ĝuas altan prestiĝon en- kaj eksterlande. Kune kun Lusin kaj aliaj verkistoj li metis la bazon de la revolucia literaturo kaj kulturo de Ĉinio post la “Maj-Kvara Movado”¹. En la periodo de la demokratia revolucio ĝis la socialisma revolucio, per siaj verkoj Mao Dun draŝis la mallumajn fortojn en la socio, prikantis la luktadon de la popolo kaj kreis grandiozan historian bildon de Ĉinio en la dudeka jarcento. Li heredigis al la posteuloj sian abundan verkaron *Plena Kolekto de la Verkoj de Mao Dun* en kvardek volumoj jam eldonitaj. Inter liaj verkoj, plej influhavaj kaj plej multe tradukitaj estas liaj noveloj *Printempaj Silkraŭpoj* kaj *La Butiko de Familio Lin*² kaj la romano *Noktomezo*.

La romano *Noktomezo* estis grava rikolto de la maldekstra literatura movado en la tridekaj jaroj de la lasta jarcento kaj unu el la klasikaj verkoj de la ĉina moderna literaturo en la dudeka jarcento. Ĉina renoma literatura kritikisto Qu Qiubai asertis: “Ĝi estas la unua sukcesa romano realisma de Ĉinio.”, “en la jaro 1933-a de la literatura historio sendube registriĝos la eldono de *Noktomezo*.”³ Faktoj pruvis, 70 jarojn post la eldono de

¹ Ĉina politika kaj kultura movado kontraŭ feŭdismo kaj imperiismo en la kvara de majo de la jaro 1919-a.

² Ambaŭ noveloj estas esperantigitaj kaj aperis en *Ĉina Antologio* (1919-1949).

³ Cit. el la artikolo *Noktomezo kaj la Jaro de Naciaj Varoj* de Qu Qiubai.

NOKTOMEZO

Noktomezo, ke ne nur en la jaro 1933-a de la literatura historio, sed ankaŭ en la literatura historio de la dudek-unua jarcento la eldono de *Noktomezo* estas registrita; ĝia vivo kaj ĉarmo de arto ne velkiĝis kun la paso de tempo, male trapasinte la precipitadon kaj testadon de la historio, *Noktomezo* fariĝis ne nur ĉina trezora literatura verko, sed ankaŭ alportis gloron al la monda literatura trezorejo. *Noktomezo* estas vasta kaj fidela rulpentraĵo pri la Ĉinio en la fruaj tridekaj jaroj, kreita per realisma metodo kun dialektika materiisma kaj historia materiisma vidpunkto post longtempa atenta observado pri la ĉina socio far verkisto Mao Dun, kiu inkluzivis multajn gravajn historiajn eventojn, militajn epizodojn kaj okazaĵojn de tiu epoko kun grandioza karaktero de tiu epoko kaj epika naturo. La romano prenis la batalon inter la nacia kapitalisto Wu Sunfu kaj la agenta kapitalisto por fremdlandaj komercistoj kiel sian ĉefan rakontan fadenon por montri, kiel Wu Sunfu, entreprenisto studinta en la Okcidento kun idealo kaj ambicio por disvolvi la ĉinan nacian industrion renkontis Zhao Botao, kiu sin apogis sur usona financa kapitalo, kaj post plurfoja luktado fine trafis tutan malvenkon. La romano priskribis komplikajn rilatojn inter diversaj specoj de kapitalistoj, bienuloj, politikistoj, sociaj papilioj, revoluciuloj, laboristoj, poeto, profesoro, advokatoj kaj scenojn de urbaj fabrikoj, borsoj, la rezidejo de s-ro Wu, kampara urbeto Shuangqiao kaj prezentis “simpozion pri la blanka urbo kaj ruĝa kamparo”, kie kontraŭdiroj kaj konfliktoj leviĝis unuj post aliaj kaj teksigis komplika intrigo tiel, ke la historio estis animskua. Per la pli ol 90 vivecaj figuroj kaj la epizodoj inter ili la verko montras al ni la kontraŭdirojn kaj esencon de la ĉina socio en tiu tempo. Ĝuste kiel Mao Dun mem diris, la romano celas montri, ke “Ĉinio ne havis vojon por disvolvi kapitalismon, kaj sub la subpremado de imperiismo, la feŭdismaj fortoj kaj la burokrataro kaj la agentaro de fremdlandaj komercistoj, ĝi fariĝis ankoraŭ pli povra duonkolonio. Kvankam inter la ĉinaj naciaj kapitalistoj troviĝis personoj kun karaktero de francaj burĝoj, tamen la duonkolonia Ĉinio diferencis de la Francio en la dekoka jarcento; la perspektivo de la ĉina nacia burĝaro estis tre malluma.”

Konsiderate laŭ la versio kaj rakonta maniero, *Noktomezo* estas nomata la unua romano pri la nuntempa socio post la literatura revolucio. En sia plurelementa strukturo kaj rakontmaniero kaj siaj sukcesaj psikaj priskriboj kaj lingvaj karakterizaĵoj, ĝi ne nur heredis la superecajn tradiciojn de realismo, sed ankaŭ metis la fundamenton de la ĉina sociala romano, kaj ĝi estas honore rigardata de ĉina literatura historiisto kiel “la plej frua signo de matureco de niaj romanoj”⁴. La fruaj verkoj de Mao Dun skulptis serion de virinoj de la “tempo”, kiuj spegulis la staton kaj vojon de la etburĝaj virinoj ĉirkaŭ la granda revolucio; kaj liaj malfruaj verkoj kreis serion de naciaj burĝoj, kaj la vojo irita de tiuj personoj formis la historion de la ĉina nacia burĝaro kaj la ĉina nacia industrio. Mao Dun aldonis al la galerio de figuroj de la ĉina moderna literaturo figurojn de la nacia burĝaro, kaj tio estas lia kontribuo al la ĉina moderna literaturo; kaj tiu kontribuo ne estis farita de aliaj verkistoj, kaj tio pliriĉigis la version de la ĉina moderna literaturo kaj la tipojn de personoj.

En la pasinta jarcento, diversaj pensfluoj, novaj doktrinoj kaj majstraj verkoj grandkvante fluis en Ĉinion per tradukado por ĉinaj legantoj. En la tridekaj jaroj aldoniĝis pli da ili. Sed pro diversaj kaŭzoj en ekonomio, komunikado, informado kaj tradukado, tre malmultaj ĉinaj verkoj estis eksportitaj. La libroj *Pajlsandalaj Piedoj* redaktita de Yi Luosheng kaj *La Viva Ĉinio* redaktita de Snow ĉefe prezentis ĉinajn modernajn novelojn al anglaj kaj usonaj legantoj, sed preskaŭ neniun romanon. Tamen *Noktomezo* estis escepto. En februaro de 1933, *Noktomezo* estis eldonita de Kaimin-Librejo, kaj en la sekvanta jaro 1934-a, la sovetia gazeto *Juna Gvardio* publikigis fragmenton de *Noktomezo*, en 1935 *Internacia Literaturo* aperigis la mallongigitan version de *Noktomezo*, kaj en 1937 aperis la kompleta rusa versio de *Noktomezo*; en 1938 aperis ĝia kompleta germana versio. Multiĝis diverslingvaj versioj de *Noktomezo* de post la kvindekaj jaroj: laŭvice aperis ĝiaj tradukoj en la ĉeĥa, japana, mongola, vjetnama, korea, pola, albana, bulgara,

⁴ Liu Shousong: *Pri la Elipso kaj Ĉielarko de Mao Dun* en la dua n-ro de *Literatura Kritiko* (1963).

NOKTOMEZO

hungara kaj aliaj entute pli ol dek lingvoj kaj la romano estis rekomendita kaj alte taksita de diverslandaj kulturaj rondoj. Laŭ mia opinio, tri el la tradukaj versioj estas aparte rimarkindaj laŭ la traduka historio kaj interfluo de literaturo: nome la rusa, la germana kaj la japana versioj.

La rusa versio de *Noktomezo* eldonita de la Literatura Eldonejo de Leningrado en 1937 estas ne nur la plej frua kompleta traduko de *Noktomezo*, sed ĝi enhavas ankaŭ la artikolon La Vojo de Literatura Kreado de Mao Dun verkitan de la tradukinto V. Rudman kaj alia, kaj la pli gravan antaŭparolon verkitan de ĉina fama verkisto kaj tradukisto Xiao San Pri la Romano *Noktomezo*. Tiu antaŭparolo analizis la kontraŭdirojn de la ĉina socio en la tridekaj jaroj laŭ la tiama situacio enlanda kaj internacia. Xiao San diris: “La romano *Noktomezo* de Mao Dun estas unika fenomeno en la ĉina literaturo en la lastaj jaroj. Eĉ plej konservativaj kaj reakciaj literaturaj kritikistoj ne povis ne konfesi, ke tiu ĉi romano estas ne nur grava atingo de la nuna plej granda ĉina verkisto Mao Dun, sed ankaŭ la plej granda atingo de la tuta literaturo.”⁵ La antaŭparolo ankaŭ diras: “Pro la eldono de tiu ĉi libro, sovetiaj legantoj fine jam povas legi verkon de Mao Dun kaj akiri ĝeneralan konon pri la ĉina revolucia literaturo, kiu pli forte disvolviĝis en la lastaj jaroj sur la fono de la unueca fronto fondita por rezistadi kontraŭ la japanaj invadantoj.” Hodiaŭ kiam ni relegas tiun antaŭparolon verkitan antaŭ 70 jaroj, ni ankoraŭ povas senti ĝiajn teorianton kaj elokventecon.

En 1938, la germana versio de *Noktomezo* far Franz Kuhn estis titolita per La Vespera Ŝanhajo kaj estis eldonita en Dresdeno. En sia prefaco, la tradukinto diras: “*Noktomezo* vekis grandegan atenton en Ĉinio kaj rapide reeldoniĝis foj-refoje. Ĝi eksterordinare montras al ni, ĝis kia grado iris la kunfandiĝo de la orienta kaj okcidenta kulturoj, kaj ĝuste pro tio mi ĝin germanigis.” En 1938 la faŝisma diktatoro de Hitler teruris en potenco en Germanio. Germanio freneze agredis aliajn landojn, kaj enlande la faŝistoj

⁵ En la verko de Li Xu: *Studado pri Mao Dun Eksterlande*. (1963)

detruis la nacian kulturon, forbruligis progresemaĵn librojn, forpelis progresemaĵn verkistojn kaj sciencistojn. Ĝuste en tiu tempo, F. Kuhn prezentis la romanon *Noktomezo* al la germana popolo. Ĝia historia kontribuo estas konfirminda. Estas interese, ke post kvindek jaroj, en 1978, Germanio eldonis alian germanan version de *Noktomezo* de Wolfgang Kubvin. La tradukinto faris plenan kaj profundan analizon pri la romano kaj eĉ montris la poezian nefidelecon de la germana versio en 1938. Kaj li signifoplene montris je la fino, ke Mao Dun “apartenas al la vico de la mondaj verkistoj” kaj multe traduki liajn verkojn estas la devo ne nur de la germanaj verkistoj, sed ankaŭ la devo de la germanaj eldonaj rondoj, kiuj sin limigas en esplorado de problemoj el la centro de Eŭropo.

En 1951, la japano Osaka Takuzi tradukis *Noktomezon* en la japanan lingvon kaj ĝin titolis per *En Profunda Nokto* kaj ĝi estis eldonita de Tiyo-da-Eldonejo. La tradukinto diras en la postparolo: “Tiu ĉi romano estas skribita de ĉino per la sango, kiu fluas el la vundo en lia korpo, kiun li faris per glavo, en dolora ĝemado. Ĝi estas anatomia bildo pri la nuna socio de Ĉinio.” “*Noktomezo* estas birdrigarda pentraĵo pri la ĉina socio prenante la metropolon Ŝanhajo kiel sian scenejon.” Ĝi povas esti “rigardata kiel ŝlosilo por kompreni la Ĉinion en transformiĝado.” Tiu analizo montris la komprenon de la profunda realismo en la romano *Noktomezo*. Post lia traduko, en la sesdekaj jaroj aperis aliaj japanaj versioj de la romano far Takada Shoji kaj Takeuti Yoshimi.

Supre mi multe parolis pri diversaj fremdlingvaj versioj de *Noktomezo* kaj iliaj rimarkindaj karakterizaĵoj. Depost 1934, aperis pli kaj pli multe da alilingvaj kompletaj versioj de la romano, tamen ankoraŭ ne aperis versio en Esperanto. Hodiaŭ, la ĉina fama esperantisto, akademiano Laŭlum, gajninto de la premio Grabowski plenumis la elĉinigon de *Noktomezo*, kaj dank’ al lia laboro tiu ĉi versio ricevis ian aŭtoritatecon. Hodiaŭ, kiam nia lando praktikas la politikojn de reformado kaj pordomalfermo, vizaĝe al la mondo kun pluraj polusoj kaj pluraj kulturoj, ni esperas, ke ĉiam pli multaj legantoj de diversaj landoj kaj regionoj povos aprezi niajn

NOKTOMEZO

eminentajn literaturajn verkojn, ke ili fariĝu pontoj inter la popoloj por kune strebadi kaj konstrui pli harmonian mondon kaj pli belan estonton de la homaro.

(Elĉinigis Laŭlum)

Noto pri la aŭtoro:

Li Xiu, profesorino kaj mentoro de studentoj por doktoreco en la Literatura Kolegio de la Pekina Normala Universitato, vicprezidanto de la Ĉina Instituto pri Mao Dun kaj ĉefredaktoro de la gazeto *Studo pri Mao Dun*.

ENHAVO

Pri Mao Dun.....	VIII
Antaŭparolo.....	XI
Unua ĉapitro.....	1
Dua ĉapitro.....	25
Tria ĉapitro.....	57
Kvara ĉapitro.....	80
Kvina ĉapitro.....	104
Sesa ĉapitro.....	130
Sepa ĉapitro.....	153
Oka ĉapitro.....	179
Naŭa ĉapitro.....	212
Deka ĉapitro.....	241
Dekunua ĉapitro.....	270
Dekdua ĉapitro.....	294
Dektria ĉapitro.....	322
Dekkvara ĉapitro.....	344

Dekkvina ĉapitro.....	386
Deksesa ĉapitro.....	414
Deksepa ĉapitro.....	437
Dekoka ĉapitro.....	465
Deknaŭa ĉapitro.....	490
Postparolo de la tradukinto.....	501

I

La suno ĵus subiris sub la horizonton. Milda brizo jen kaj jen tikle karesis homvizaĝojn. La kota akvo de Suzhou-Rivero, sorĉe ŝanĝiĝinta en oran verdon, kviete fluis okcidenten senonde. La vespera tajdo el Huangpu-Rivero fluis nerimarkite kaj levis la diversspecajn ŝipojn ĉe ambaŭ bordoj tiel alte, ke iliaj ferdekoj superis la kajojn je ĉirkaŭ duonfuto. Albloviĝis de la parko trans la rivero mallaŭta muziko sed kun timbala klakado plej klara kaj ekscita. En la krepusko, nebula gazo vualis la altan trusframon de la ŝtala Waibaidu-Ponto. Kiam tramo trapasis la ponton, la kablo pendants de la traboj sur la framo disŝprucigis jen kaj jen verdajn sparkojn. Rigardante orienten de la ponto, oni povis vidi la staplojn similajn al kolosaj monstroj kaŭrantaj en la krepusko, kun centoj da brilaj okuletoj palpebrumantaj. Rigardante okcidenten, oni vidis kun miro gigantan neonlampan reklamilon sur alta tegmento disŝutantan flaman ruĝon kaj fosforan verdon: Light, Heat, Power¹!

Ĝuste tiam, en tiu paradiza maja vespero, tri aŭtomobiloj de 1930-modela Citroen-o fulmis tra la ponto, sin turnis okcidenten kaj kuris antaŭen laŭ la Norda Suzhou-Vojo.

Preterkurinte la domblokon okcidente de la Komerca Ĉambro de Ŝanhajo ĉe la stratbuŝo de la Norda Henan-Vojo, alinomata de la loĝantoj per “Fera Ŝoseo”, kie kolektiĝis vaporŝipoj por veturi supren de la rivero, la tri aŭtomobiloj malrapidiĝis. La ŝoforo de la unua aŭto diris mallaŭte al la apude sidanta giganta viro en nigraj silkvestoj:

“Guanĉjo, Daishengchang-Kompanio, ĉu ne?”

¹ Anglaj vortoj signifantaj: Lumo, Varmo, Forto.

“Jes, ja!” respondis Guan same mallaŭte, montrante siajn fortajn dentojn ŝajne taŭgajn por mordrompi feran stangeton. “Ĉu vi forgesis? Vi certe estas senprudentigita de tiu fiulino!”

Ĉe tiuj vortoj de Guan, kiu estis korpogardisto, la aŭto haltis kun knaro kaj Guan tuj elsaltis, metante sian manon sur la revolveron ĉe la talio. Li ĉirkaŭrigardis, poste iris al la alia pordo de la veturilo kaj staris flanke de ĝi en impone brava aspekto. El la aŭto etendiĝis kapo – kvadrata purpurebruna vizaĝo aknoplenta kun densaj brovoj kaj rondaj okuloj. Rimarkinte la ŝildon kun la nomo “Ŝipkompanio Daishengchang” super la pordego de eŭropstila domo en la fronto, ankaŭ tiu salte descendis kaj iris rekte en la pordegon, sekvate de Guan ĉe la kalkanoj.

“Ĉu la ŝipo Fluga Nubo tuj alvenos?” demandis la viro purpurvizaĝa arogante per laŭta kaj klara voĉo.

Li estis ĉirkaŭ 40-jara, kun potenca korpo kaj impona sinteno, ke je la unua vido oni jam povis scii, ke li estas magnato al kutimiĝinta ordonadi. Apenaŭ li finis sian demandon, la oficistoj de la kompanio tie sidantaj tuj stariĝis kiel unu persono, kaj alta malgrasulo inter ili elpaŝis ridante per la tuta vizaĝo kaj respondis respektoplene:

“Jes, tuj! Sinjoro la Tria, bonvole sidiĝu. – Alportu teon!”

Tion dirante, la maldikulo altiris seĝon kaj metis ĝin post Sinjoron la Trian, kies muskoloj de la vizaĝo kontraŭiĝis kvazaŭ por rideti je tio, kaj ĵetinte rigardon al la alta maldikulo la sinjoro direktis siajn okulojn ekster la pordegon. Dume, lia aŭto jam liberigis la lokon por la sekvanta veturilo, kiu alvenis. El ĝi descendis viro kaj virino, kaj ankaŭ ili envenis. La viro estis malalta kaj diketa, kun afabla blanka vizaĝo. La virino tamen estis multe pli alta, kun kvadrata vizaĝo iom simila al tiu de Sinjoro la Tria, tamen ŝia haŭto estis kremeca. Ili ambaŭ aĝis pli ol kvardek jarojn, tamen la virino en siaj ŝikaj vestoj aspektis nur ĉirkaŭ tridekjara. La viro alparolis la unua.

“Sunfu, ĉu ni atendu ĉi tie?”

Antaŭ ol la purpurvizaĝa Sunfu povis respondi al li, la alta maldikulo de la kompanio tuj diris ridmiene:

“Jes, ĉi tie, sinjoro Du. Jam aŭdiĝis fajfoj. Mi jam sendis iun por atendi sur la kajo, kaj li tuj revenos por raporti, kiam la ŝipo alvenos